

Conrad Ferdinand Meyer,  
Paco sur tero

*tradukita de Willy Nüesch*

La paŝtistoj en libero  
Lasis gregon, l' anĝelvorton  
Portis tra la basan pordon  
Al patrino kaj infan'.  
Plu kantadis en lontan'  
Ĉielgent' en spaco stela,  
Plu sonoritis la ĉiela  
"Paco, paco sur la tero!"

Ekde tiu vort' anĝela  
Ho ve, kiom da kruela  
Faris la militkolero  
En kiras', sur rajdobest'!  
Ofte dum kristnaska fest'  
Ĥor' spirita kantis time,  
Insistpete, plendesprime:  
"Paco, paco ... sur la tero!"

Sed eternas kredregulo,  
Ke ne ĉiam la feblulo  
Iĝos pred' kaj rabkonkero  
De aroga murdogest':  
Iaspeca justo-est'  
En horor' kaj murdo rolas,  
Regno sin konstrui volas,  
Serĉas pacon sur la tero.

Iom post iom ĝi formos  
Sin, oficos sankte, forĝos  
Batalilojn sen danĝero,  
Flamoglavojn por la rajt'.  
Filoj kun fortenco-trajt',  
Reĝa gento ekburĝonos,  
Kies helaj tubjoj sonos:  
Paco, paco sur la tero.

...

Conrad Ferdinand Meyer,  
Paco sur la Tero

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Kiam la paŝtistoj sian  
Gregon lasis kaj la Dian  
Vorton portis tie iam  
Tra la pordo de kaban'  
Al patrino kaj infan',  
Kantis plu la anĝelar'  
Kun promes' al la homar':  
"Paco sur la Ter' por ĉiam!"

Kantis tiel l' anĝelar',  
Spertis tamen la homar'  
Kiom da sufer' de tiam  
Pro milito kaj malam'  
En la Sankta Nokto jam!  
Kantis ili petegante  
Kaj mallaŭte akuzante:  
"Paco sur la Ter' por ĉiam!"

Estas tamen daŭra kredo,  
Ke la malfortul' ne predo  
De perforto estu ĉiam.  
Batos iam ties horo,  
Eĉ en murdo kaj teroro  
Da justec' enestas io.  
Estos hom-generacio,  
Kiu pacon serĉos iam.

Malrapide ĝi formiĝos,  
Ĝia tasko plenumiĝos.  
Forĝos ĝi armilojn iam,  
Kiu estas sen danĝer',  
Kiu portos al la Ter'  
Pacon, kiu ne plu ĉesas,  
Kiel l' anĝelar' promesas:  
Paco sur la Ter' por ĉiam!

...

*Traduko de la Germana poemo “Friede auf Erden” de CONRAD FERDINAND MEYER (Konrado Ferdinando Majero, \*1825-10-11 – †1898-11-28) en Esperanton de WILLY NÜESCH (Etselstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, \*1927-05-09).*

*Arg-101-274 (2013-08-28 18:38:58)*

*La tradukinto, s-ro Willy Nüesch (Etselstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, tel. 0041-31-302 66 56), donis al mi, Manfred Retzlaff, en 2005-07-11 la skriban permeson pri la publikigo de tiu ĉi poemo en mia retejo “www.poezio.net”. La poemo enestas ankaŭ en la libro “Elektitaj poemoj de Conrad Ferdinand Meyer”, kiun eldonis s-ro Willy Nüesch. Ĝi estas aĉetebla ĉe li aŭ ĉe la libro-servo de UEA (Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando).*

*Traduko de la Germana poemo “Friede auf Erden” de CONRAD FERDINAND MEYER (Konrado Ferdinando Majero, \*1825-10-11 – †1898-11-28) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2003-12-12.*

*MR-411-1 / Arg-101-206 (2005-08-01 13:06:34)*

*Conrad Ferdinand Meyer estis svisa poeto, verkisto kaj tradukisto, kiu naskiĝis en la svisa urbo Zuriko (Zürich), verkis precipe en la germana lingvo lirikaĵojn kaj romanojn, sed ankaŭ romanojn en la franca lingvo. Pliaj detaloj pri lia vivo troveblas en la interreto interalie en <http://www.xlibris.de/Autoren/MeyerMeyer-Biographie/Meyer-Biographie-03.htm>.*